

**Kiamaniere
distingi
la fungojn?**



**Come
distinguere
i funghi?**

Mario Simondetti

ENKONDUKO

Ĉiuj scias ke ekzistas venenaj fungoj kaj la samo okazas pri la serpentoj. La venenaj serpentoj mortigas mordante, la venenaj fungoj se oni manĝas ilin. Iuj nevenenaj sed grandaj serpentoj estas danĝeraj pro sia forto ĉar ili povas sufoki nin ĉirkaŭvolvante nian korpon per la sia; sed ni povas gardi nin ĉar ilia grandeco vidigas ilin; male, pri la fungoj, ni ne havas evidentajn distingajn karakterojn kaj nur necesas koni ilian specon por distingi la venenajn de la sendanĝeraj.

Kial timi sendanĝeran kolubron ĉar oni ne konas ĝin? Kial ne manĝi bonan fungon ĉar oni ne kapablas distingi ĝin de nemanĝebla? Necesas konsideri ke granda kvanto da fungaj specoj, en la vulgara senco per kiu ni kutime nomas ilin kaj nur pri kiuj ni pritraktos en ĉi tiu libreto, ne estas venenaj, kaj inter ili sufiĉe granda kvanto da specoj estas bone manĝebla. Kial do neglekti tiom da bonaj fungoj ĉar oni ne konas ilin? Kial ne eviti ke bedaŭrinde sufiĉe multnombro da personoj mortu ĉiujare venenitaj pro nescio de la speco de la fungo? La statistikoj parolas pri milo de mortintoj en la sola Eŭropo el la dekmil frapitaj ĉiujare.

La fungojn oni povas ankaŭ ne aĉeti, oni povas serĉi kaj trovi, kaj eĉ granda ĝojo estas ekvidi kaj observi ilin en sia medio; do ili povas kosti ankaŭ nenion. Ili estas nutraj ĉar kune kun sufiĉa kvanto da celulozo ili entenas bonan kvanton da proteinoj, kiuj estas la plej nutraj substancoj utilaj por la formo de la korpaj histoj. Pro ĉi tiuj bonaj kvalitoj la fungoj estas ankaŭ kutime nomataj la viando de la malriĉulo; kial do preterlasi ilin?

Precipa celo de ĉi tiu libreto estas rekonigi per kio eble plej facila kaj certa maniero, sufiĉe grandan nombron da specoj (ili estas

centoj en niaj landoj sed se ni konsideras ilian abundon kaj disvastigon oni povas redukti ilin al multe malpli) por ke oni povu utiligi ĉi tiun naturan riĉecon de la tero por nia nutrado. Komprenoble la vere mortigaj specoj, kiuj estas tre malmultaj, estos speciale traktataj.

Kia estas la diferenco inter la mortigaj kaj nemortigaj fungoj? Jen la klarigo: la simptomoj de venenado per la vere mortigaj specoj aperas ne pli frue ol 10-12 (sed iasoje ankaŭ 24) horojn post la engluto, ĉiam estas do tro malfrue por interveni per rimedoj: la venenaj (toksaj) principoj estas tiam jam en la sango kaj plu nenion oni povas fari. Male, la simptomoj de ĉiuj aliaj venenaj specoj aperas ĉirkaŭ tri horojn post la engluto, do dum la digesto, kaj per naturaj rimedoj (vomado kaj kolikoj) aŭ laste per stomaka lavado, oni povas elimini la venenajn principojn; komprenoble la stomaka lavado ne estas amuza afero por kiu devas suferi ĝin, ĝi estas tamen de preskaŭ certa sukceso.

Pri niaj fungoj, multaj specoj estas ankoraŭ dubaj aŭ suspektaj pri sia nutradebleco ĉar ne facile estas trovi iun kiu konsentu fari tiajn provojn. Fakte en la lastaj jaroj iu kvanto da specoj estis rekonataj kiel manĝeblaj dum sur libroj oni legas ke ili estas venenaj. Tre laŭdinda kaj malegoista estus do tiu kiu helpu solvi ankaŭ nur unu dubon pri unusola speco! Bedaŭrinde estas la provo de nutrado sur ni mem aŭ sur disponebla homo ke necesus, ĉar oni povas aserti kun certeco ke la provoj kutime uzataj de metala manĝilo, de monero aŭ de petroselo, kiuj devus nigriĝi la du unuaj kaj flaviĝi la tria dum la kuirado se la fungo estus venena, aŭ tiu de nutrado de domaj animaloj kiel hundo aŭ kato, estas tute senutilaj. Nur la determino de la speco donos al ni indikon utilan.

Ni notu ke ni diris ke la vere mortigaj specoj estas tre malmultaj: oni sciu ke ili estas kalkuleblaj preskaŭ sur la fingroj de unusola mano. Sed tial ke inter ili nur unu speco, la Amanita phalloides (sciencia, t. e. latina nomo) kun siaj varioj, estas trovebla en sufiĉe granda kvanto, dum la aliaj estas tre maloftaj ĉar oni trovas el ili nur individuajn, izolitajn ekzemplerojn, oni povas kompreni la aserton ke la venenadoj estas preskaŭ ĉiam imputeblaj al tiu speco, ĉar estas tre

probable ke oni povu manĝi sufiĉan kvanton da ĝi (la mortiga kvanto estas ĉirkaŭ unu hektogramo de freŝa fungo popersone) por havi mortigajn konsekvencojn, dum male estas tre malprobable ke tion oni povu fari kun la aliaj.

La konsiderotaj specoj kreskas tra la tuta Eŭropo kaj ankaŭ en aliaj partoj de la mondo kaj mi esperas ke mia verketo utilos almenaŭ al ĉiu eŭropa loĝanto ĉar mi uzis la helplingvon ESPERANTO'n, tro multnombraj estante tiuj de nia kontinento.

Mi estas konvinkita ke Esperanto povos fariĝi la lingvo de l'estonto, dank'al siaj kvalitoj de simpleco de lernado kaj praktikeco, kaj aparte por la scienco pro sia precizeco. Dezirante akceli ĝian praktikan enkondukon, mi diras al tiuj kiuj intencos plie ĝui la naturan teran riĉecon de la fungoj: lernu Esperanton kaj vi trovos en ĉi tiu libreto tion kiu utilos al vi.

GRAVEGA AVERTO

legenda antaŭ la uzo de la sekvo

Por bone determini la specon de fungo, necesas havi bonajn ekzemplerojn, t. e. sanajn, regulajn, eble sendifektajn kaj de meza kresko (t. e. ne tro junaj aŭ tro maljunaj) ĉar oni scias ke la formo de la fungoj ofte tre ŝanĝas laŭ ilia grado de kreskado. Se oni ne havas elektablecon, t. e. se oni devas ekzameni nur per unu ekzemplero, la probableco de bona determino estos malgranda, ĉar ĝi povas ne esti en la kondiĉoj antaŭe indikitaj, sed se oni grupigos la diversajn kvalitojn okaze de rikolto cele de manĝado, kiu estas afero sufiĉe facila ankaŭ se inter la fungoj estas iuj de diversa grado de kresko. aŭ se oni ne konas la specon, facile estos elekti unu aŭ plurajn pokvalite por ekzameni ilin. Cetere, tre utila estos la fakto havi ilin, ĉar ofte la distingaj karakteroj rilatas al juna aŭ al plenkreska fungo.

Per la vorto « fungo » ni intencos do ĉiam ekzemplerojn elekten-dajn tiamaniere.

Pri la vortoj « genro » kaj « speco », sufiĉas ĉi tie sciigi ke ili estas dividoj starigitaj de la sciencistoj por konveno de studo kaj de klasifiko, kaj ke « genro » entenas unu aŭ pluraj « specojn »; genro estas do specaro. Ĉiam ni indikos sciencan (latinan) nomon de genro per granda (majuskla) litero kaj tiun de speco per mal-granda (minuskla).

Oni adoptis sistemon tieldiritan de « dikotoma ŝlosilo », t. e. ke oni devas ĉiufoje kaj por ĉiu numero elekti inter du aŭ pluraj kazoj kiuj kondukas, per progresaj sinsekvaj numeroj, kaj per escepto de la aliaj, al la fina determino de la fungo aŭ de grupo de ili.

1. Kiam vi havas fungon bone kreskitan (legu la gravegan averton!) vi devas kaj povas tuj atribui ĝin al unu el la sekvantaj ses grupoj:

- ◊ La fungo aspektas pli malpli ombrelon, t. e. havas tigon kaj sufiĉe larĝan kaj rondan ĉapelon (vidu skeman bildon 1) iru al la sekvanta n° 2
 - ◊ La fungo havas tigon, sed la ĉapelo estas spong- aŭ oreforma (vidu bildon 2) saltu al la n° 53
 - ◊ La fungo aspektas kiel koralo aŭ arbo pli malpli disbranĉigita (vidu bildon 3) saltu al la n° 60
 - ◊ La fungo estas sfer- aŭ pir- aŭ klabforma (vidu bildon 4) saltu al la n° 61
 - ◊ La fungo estas subtera tubero (vidu bildon 5) saltu al la n° 65
 - ◊ La fungo havas aliajn formojn saltu al la n° 66
-

2. Se vi asignis vian fungon al ĉi tiu numero, vi devas observi ĉu:

- ◊ La subo de la ĉapelo havas radiajn lamenetojn, konfluantajn al la tigo (vidu bildon 1). N. B. Estas ĉi tiu la granda grupo de la agarikoj aŭ agarikakoj). iru al la sekvanta n. 3
 - ◊ La subo de la ĉapelo havas supraĵon plena de trutoj (vidu bildon 6) saltu al la n. 45
 - ◊ La subo de la ĉapelo havas karnajn dornetojn (vidu bildon 7) saltu al la n. 52
-

3. Se vi destinis vian fungon al ĉi tiu numero, vi devas bone observi (eventuale per simpla lenso) ĉu:

- ◊ La lamenetoj de la ĉapelo aspektas kiel tranĉitaj, t. e. havas la randon akra iru al la sekvanta n. 4
 - ◊ La lamenetoj de la ĉapelo aspektas kiel falditaj sur si mem, do ne havas akran randon, sed iomete rondigitan. Ili estas do dikaj kaj krome kunligitaj la unuaj kun la aliaj, per aliaj faldoj, aspektante reliefajn vejnojn saltu al la n. 44
-

4. Se vi fiksitis vian fungon al ĉi tiu numero, vi devas konstati la koloron de la spora depono kaj tiucele vi devas disponi kelkajn horojn por havi ĝin. Tiucele, prenu bonan ekzempleron *maturan* (la ĉapelo de la maturaj fungoj estas preskaŭ ĉiam ebenigita anstataŭ ol kurba) (dube, prenu du aŭ tri), fortranĉu la tigon je la alteco de la lamenetoj, t. e. izolu la ĉapelon, kaj

metu ĝin sur paperfolion kun la lamenetoj turnitaj al ĝi; la paperfolio devas esti nigra aŭ almenaŭ malhela se la lamenetoj aspektas blankaj aŭ helaj; male, blanka, se la lamenetoj estas koloraj. Post kelkaj horoj (ekzemple post nokto) vi vidos la sporan deponon kiel aspektas sur la bildo 8, ĉar la matura fungo lasis la sporojn fali el inter la lamenetoj, kiel nepalpebla pulvoro; vi kaptos tiam ĝian koloron, kiu povos esti:

- ◊ blanka aŭ helflava aŭ helrozflava iru al la sekvanta n. 5
- ◊ rozkolora saltu al la n. 26
- ◊ okra (bruna, brunruĝa, brunflava) saltu al la n. 31
- ◊ violkolora (ofte ne pura sed iomete grizviola) saltu al la n. 38
- ◊ nigra saltu al la n. 41

N. B. - Kompreneble, se la lamenetoj de la koncerna fungo aspektas blankaj aŭ tre helaj, ne necesas la spordepono kaj oni povas tuj iri al la n. 5.

Tamen ne lasu vin trompi per la ŝajno: iuj fungoj lasas spordeponon mal-similan al koloro de siaj lamenetoj: ekzemple, la tutvioleta *Tricholoma nudum* donas helflavetan spordeponon (ĝi estas por la n. 5) dum la genro *Psalliota*, kiu havas rozajn aŭ brunajn lamenetojn, donas grizvioletan spordeponon (por la n. 38).

5. Por certe decidi inter la du sekvantaj eblecoj, fendu la fungon en ĝia mezo, laŭlonge, kiel sur bildo 9, kaj observu kiamaniere la lamenetoj finas sur la tigon: ĉu ili finas perpendikle (t. e. formante ortangulon) al la tigo (la perpendiklecon oni povas konstati ankaŭ se la tigo estas en tiu punkto kurba, rigardu la bildon), aŭ per akuta angulo (bildo 10), aŭ, antaŭ la fino sur la tigo, ili prezentas sulketon (bildo 11), aŭ eĉ ili ne finas sur la tigon sed sub la ĉapelon lasante cirklan kanalton inter si kaj la tigo (bildo 12)

iru al la sekvanta n. 6.

- ◊ aŭ ĉu la lamenetoj finas sur la tigon per obtuza (eventuale ankaŭ plata) angulo, t. e. pli malpli iom akompanante malalten la tigon (bildo 13 kaj 14) saltu al la n. 21

N. B. - Nur la grupo de la laktarioj (vidu n. 15) kies specoj povas prezenti ambaŭ ĉi tiujn eblecojn, sed kiuj estas karakterizaj pro ilia lakto, postulas anticipatan diagnozon (vidu n. 14) ĉar ni asignos ilin al la unua ebleco.

6. Se vi asignis vian fungon al ĉi tiu numero, vi devas konsideri ĉu:

- ◊ laŭlonge la tigo estas kolringo aŭ kolumo de diversaj formoj kaj pozicioj sur la tigo; la fungo ne devas esti tro maljuna, alie la kolringo povas esti foririnta iru al sekvanta n. 7
- ◊ la tigo estas nuda, kun nenio ĉirkaŭe saltu al la n. 12

7. Se vi destinis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi devas observi ĉu:

- ◊ krom kolringo sur la tigo, ĉeestas ankaŭ, baze de ŭu ĉi, ofte duonenterigita, speco de ingo (iafoje duonovforma) kiu eltenas la tigon kaj el kiu ĝi eliras; ĉi tiu ingo nomiĝas *vulvo* (vidu bildon 15) kaj precipe se la funĝo estas tro maljuna aŭ se ĝia elŝiro el la tereno estis tro kruda, la vulvo povas resti en la tereno. Iufoje tiu vulvo aspektas nur kiel ŝvelaĵo sur la malsupera parto de la tigo sur kiu estas elstarantaj cirklaĵaj linioj iru al la sekvanta n. 8
- ◊ ĉeestas nur la kolringo saltu al la n. 9

8. Se vi fiksas vian funĝon al ĉi tiu numero, vi havas antaŭ vi *amaniton*, unu el la plej gravaj kaj eĉ la plej gravan genron de funĝoj, ĉar ĝi ampleksas specon kiu estas la plej vulgare konata el la bildpunkto, flanke de la plej mortiga kaj de unu el la plej ŝatataj specoj. Bonŝance la diversaj specoj estas tre bone distingeblaj inter si. Jen la ĉefaj:

1) ĉapelo glata, hele verda-flava (olivkolora) pli intense sur la centro, iafoje preskaŭ blanka; subo, t. e. lamenetoj, tigo, kolringo (kiu aspektas manumon) kaj vulvo, blankaj; ĉe maljunaj ekzempleroj, en kiuj la tigo maldikiĝas, rozruĝaj makuletoj aperas sur la dubeblanca ebenigita ĉapelo. Jen la *Amanita phalloides*, la plej venena funĝo el ĉiuj kaj la sola vere mortiganta, ĉar la efiko de unu el ĝiaj veneno, la amanita toksino, tre firma ankaŭ al 100° kaj post longaj jaroj en la seka funĝo, evidentiĝas, kiel mi jam diris, nur post sufiĉe longa tempo, dum alia venena substanco, la amanita hemolizino, ne rezistas al kuirado, rapidege malaperas dum la sekiĝo de la funĝo kaj estas malrapide detruata de la ventra suko. Ĝi estas ankaŭ unu el la plej perfektaj funĝoj el la morfologia vidpunkto; ĝi prezentas, fakte, kun malmultaj aliaj specoj, la du vualojn, t. e. la tutan kaj la partan, dum la granda plimulto de la agarikacoj prezentas nur la partan. Kio estas la du vualoj? Por la plej bona komprenejo de la kreskado de funĝo kaj la pli facila ĝia rekono en la diversaj momentoj de tiu kresko, ŝajnas al mi oportune montri per kelkaj bildoj kio estas la du vualoj: la unua, la pli grava (bildo 16), estas tiu speco de membrano aŭ haŭto kiu enhavas la tutan funĝon je ĝia ekapero el la tereno (latine: *velum universale* aŭ totale); estas pro tio ke tiaj funĝoj aspektas ovo je ilia ekapero ekster la grundo. Pro la kresko de la funĝo tiu membrano fendiĝas supere, lasante vidi la ĉapelon, kaj pro plua kresko ĝiaj restoj povas evidentiĝi en du lokoj: malsupere, *ĉiam*, kiel vulvo (legu n. 7), supere, *iafoje*, kiel verukoj sur la ĉapelo. Ĉiuj amanitoj havas do ĉiam la vulvon kaj iafoje la verukojn. La dua vualo, malpli grava sed pli ofta, (latine: *velum partiale*) (bildo 17) estas ree speco de haŭto kiu ŝirmas kaj protektas, kiam la funĝo estas juna, la regionon de la sporoj, t. e. de la organoj destinitaj al la grava tasko de la reproduktio. Kompare kun la tuta vualo, la parta estas interna al ĝi, ĉar en juna funĝo malpermesas la vidon de la lamenetaro (aŭ de la truetaro, ĉar ĝi ekzistas ankaŭ ĉe la poliporacoj, vidu duan eblecon de la n. 2, kaj n. 45), kovrante ĝin. Estas ĝi kiu originigas iafoje kolringon aŭ kolumon (vidu n. 6) ĉar dum la kreskado de la funĝo, kiam ĉi tiu atingas la plenkreskan kondiĉon, ĝi disiĝas

ĉe la ĉapelrando, restante iafoje parte kunligita al la tigo kiel kolringo au kolumo Kiam do vi vidas fungon en kiu la lamencaro (au 'a truetaro) estas nevideblaj, vi scios ke ĝi estas juna (kompreneble tiu fungo ne utilis por la spordepono!) kaj se vi volos vidi tiujn karakterizajn partojn, vi devos ŝiri tiun membranon, au atendi ke ĝi mem dissiriĝu

Okaze de la priskribo de la kresko de fungoj, oni povas ankaŭ doni ideon pri ĉi tiuj strangaj vegetaĵoj kio respondas en la fungo al ordinara trunko kaj branĉoj de alia vegetaĵo? Estas la *micelio*, speco de reto kun la maĉoj pli malpli densaj, de maldikegaj fadenoj, preskaŭ al ni nevideblaj, horizontale enterigitaj sub malmulte da centimetroj de tero kaj etendiĝanta ec tra pluraj kvadratmetroj (bildo 18) Kiam la sporoj, kiu respondas al semoj de aliaj vegetaĵoj, falas el la fungo sur la grundon, ili naskas ĉi tiun micelion (bildo 19) kaj la fungoj kiuj eliĝas el la tero en variaj lokoj de ĉi tiu micelio, sufiĉe respondas al fruktoj de kutima vegetaĵo jen kial ni trovas ofte pl'urajn fungojn apuce, same kiel ni trovas plurajn fruktojn en vegetaĵo, malsimilo kun la aliaj vegetaĵoj estas la rapideco de la kresko, multe pli granda en niaj fungoj ol en aliaj vegetaĵoj, post malmulte da horoj la fungo estas plene kreskita, dum disvolviĝo en florojn kaj fruktojn povas postuli multajn tagojn

2) ĉapelo glata, ruĝa (oranĝ , ĝis karminruĝa) subo (escepte la vulvo) sulfurflava, vulvo blanka *Amanita caesarea*, unu el la plej ŝatataj fungoj de niaj manĝejoj

3) ĉapelo ruĝa kiel en la antaŭa speco sed pli malpli disŝutata per dube blankaj verukoj, subo blanka La plej konata speco kiam oni devas reprezenti fungon en bildoj aŭ en la animitaj kartonoj

Amanita muscaria, nemanĝebla ĉar ĝia venena substanco, la muscarino, kvankam ne mortiga, kaŭzas severajn malsanetojn

4) ĉapelo griza violkolora, kun pli helaj verukoj, la piedo de la tigo estas karakterize vinkolora, precipe interne *Amanita rubescens*, tre bona manĝebla, facile kuirebla

5) ĉapelo tre helflava, disŝusata per pli malhelaj verukoj, subo blanka, la speco odoras rapon kaj, kvankam ne venena lau la plej aktualaj provoj, oni ne manĝas ĝin ĝuste pro ĝiaodoro *Amanita mappa* (au *citrina*)

6) ĉapelo bruna kun grizblanketaj verukoj, subo griza *Amanita pantherina*, venena ĉar entenas la panterinon, venenan substancon kiel la muscarinon

7) ĉapelo griza kun pli helaj verukoj *Amanita spissa*, manĝebla

8) ĉapelo intense flava kiel kanario, kun blankaj verukoj *Amanita junquillea*, bone manĝebla

9 Se vi atribuis vian fungon al ĉi tiu numero, vi devas observi ĉu

◇ la kolringo, similante manumon, larĝiĝas supren (bildo 20, flanke de 17) iru al la sekvanta n 10

◇ au malsupren (bildo 21)

salto al la n 11

10 Se vi asiguis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi havas *lepioton*, kies genro la ĉefa speco estas *Lepiota procera*, ofte tre granda (20-30 cm alta kaj kun ĉapelo de 20 cm de diametro), ĉapelo helbruna, aspektante ombrelon, kun grandaj, nombraj, pli malhelaj verukoj, neregule aranĝitaj, elstarantaj. La kolringo, ĉe la plenkreskintaj ekzempleroj, estas libera sur la tigo, laulonge kiu ĝi povas esti allokata. La speco troviĝas precipe en la herbejoj kaj dank'al sia grandeco estas ofte videbla jam de malproksime. La junaj ekzempleroj aspektas tamburfrapilo, ĉar la ĉapelo ankoraŭ ne disvolviĝis pro tio ĝia vulgara nomo de tamburfrapilo, ĝi estas speco tre bone manĝebla, sed nur la ĉapelo.

Aliaj specoj de lepiotoj, ĉiam malgrandaj (maksimuma diametro de la ĉapelo 5-6 cm) ofte kun malgrandaj franĝoj pendantaj de la ĉapelrando kiel resto de la parte vualo, estas evitendaj ĉar inter ili estas suspektaj au eĉ venenaj specoj, cetere malprobable estas ke oni povu kolekti sufiĉan kvanton de ĉi tiuj malgrandaj funĝoj kun tre maldika ĉapelo, por valori manĝadon de ili.

11 Se vi destinis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi havas *armilarion*, kies genro la ĉefa speco estas la *Armillaria mellea* (= miela, pro lia koloro). Ĉapelo kaj tigo flavetaj brunaj, la unua disŝutata ofte per pli malpli multnombraj brunaj veruketoj, la dua ĉiam maldika kaj kun la kolringo tre alte lokata sub la ĉapelo. La speco, kiu neniam montras tre grandajn ekzemplerojn (maksimuma ĉapela diametro 8-10 cm) kreskas en multaj ekzempleroj kune (ofte ankaŭ pluraj dekoj) kunligitaj per la piedo, piede de la arboj fakte ilia micelio (vidu n. 8) kuŝas inter la lignaj fibroj de arboj, ankaŭ se arbo estas dehakita, lasante la radikon en la tero kiel stumpon, ĉi tiuj funĝoj kreskas amase el ĝi. Ĝi estas ofta speco kies estas facile kolekti sufiĉe grandan kvanton dank'al ĉeesto de multaj funĝoj kune. Bone manĝebla, kvankam ne tre delikata, post forporto de la tigo en la plej maljunaj ekzempleroj, la junaj aspektas najlon kun granda kapo, pro tio ilia itala vulgara nomo de « najletoj ».

12 Se vi fiksas vian funĝon al ĉi tiu numero, vi devas rigardi ĉu

◇ la funĝo havas vulvon (vidu n. 7) iru al la sekvanta n. 13

◇ au ne saltu al la n. 14

13 Se vi atribuis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi havas specon kiu povas prezenti diversajn kolorojn de la ĉapelo el plumbo griza ĝis flavoranĝa, ĝia rando estas transverse striata, subo, kun la tigo ĉiam maldika, blanka, bone manĝebla speco, delikata, ĝia latina (scienca) nomo estas *Amanitopsis vaginata*.

14 Se vi asiguis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi devas observi ĉu

◇ likvaĵo kiel lakto (sed de variaj koloroj) eliĝas gutgute el la funĝo, precipe

el la lamenetoj kiam oni rompas aŭ tranĉas ilin, ankaŭ nur per onĝlo
iru al la sekvanta n. 15
↔ neniuj partikulara okazas rompante la funĝon saltu al la n. 16

15. Se vi atribuis vian funĝon al tiu ĉi numero, vi havas *lakŝarion*, kies etimologio mi jam klarigis en la antaŭa numero. La specoj de ĉi tiu sufiĉe grava grupo havas alian karakteron en sia aspekto: dum la junaj ekzempleroj havas la ĉapelon preskaŭ volvitajn sur si mem, malsupren, je la rando, la plenkreskintaj, pro altiĝo de la rando, prenas kutime la formon de tre larĝe malfermita funelo, sen truo en la centro, kie estas tamen kavoj kiu ĉe malseka vetero retenas ofte akvon. La ĉefa kaj pli utila speco estas la *Lactarius deliciosus*: la tuta funĝo estas heloranĝa, la ĉapelo havas liniojn kiel koncentrajn rondojn, la tigo havas pli malhelajn makulojn; premo de fingro igas la funĝon malpure verda kaj makuloj de tiu ĉi koloro ĉeestas ankaŭ sur la netuŝita funĝo; la lakto estas ruĝoranĝa. Kiel indikas la latina nomo, estas ĉi tiu unu el la plej ŝatataj funĝoj kvankam ĝia aspekto estas trompa kaj malmulte invitanta; unu el la receptoj por manĝi ĝin estas: oni fortranĉu la tigojn kiuj estas kavaj, oni rulu la ĉapelon en pistita pankrusto malsekigita per ovo (ovoblanko kaj flavo) kaj oni kuiru fritante ĝin. Iom simila estas la *L. torminosus* sed ĝia lakto estas blanka kaj tre akra, pikanta je la gusto kiel pipro: cetere la gusto de la lakto de ĉi tiuj funĝoj estas bona signalo por ilia manĝebleco: se la gusto estas milda, la speco estas manĝebla, se pipra, ne.

Aliaj specoj estas: *L. scrobiculatus* (latine scrobiculus estas malgranda kavoj, pro ĝiaj kavetoj sur la tigo) nekofuzebla pro sia flava koloro, havas lakton blankan kiu fariĝas flava en la aero, kaj troviĝas ankaŭ en grandaj ekzempleroj (ĝis 25-30 cm. de ĉapela diametro); ĉiam opiniata kiel venena estas nuntempe nur suspekta kvankam la lakto estas pipra. Kun la sama ŝanĝo de koloro de la lakto estas la *L. thejogalus* (aŭ *chrysorrhoeus*) ankaŭ kun la lakto pipra, do rifuzenda. Tri blankĉapelaj specoj, t. e. *L. piperatus*, *vellereus* kaj *controversus* distingeblaj inter si ĉar la dua havas la supraĵon de la ĉapelo kiel velura kaj la lamenetoj pli maldensaj ol la unua, kaj la tria la lamenetojn hele rozajn, estas prudente rifuzendaj ĉar ilia lakto estas pipra, kvankam estas opiniataj kiel manĝeblaj.

El tri aliaj specoj kun la ĉapelo brunruĝa unuforme, *L. volemus*, *rufus* kaj *mitissimus*, la unua kaj la tria, havantaj lakton blanka kaj milda, estas bone manĝeblaj kaj la dua, kun la lakto same blanka sed pipra, ne. La unua estas krome bone distingebla de la tria, unue pro sia pli granda dimensio kutime kaj due pro sia karakterizaodoro de fumigita aringo.

16. Se vi destinis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi devas konsideri ĉu:
↔ ĝi, ĉiam malgranda sed brile kolorita (ruĝe, flava, k.t.p.) havas ĉapelon evidente alte konusforman, maldikan, rompeblan, kaj la tigon kava
iru al la sekvanta n. 17
↔ aŭ ĝi ne posedas tiujn karakterojn saltu al la n. 18

17. Al ĉi tiu grupo apartenas la subgenro *Hygrocybe* de la genro *Hygrophorus*; ĝi entenas fungetojn troveblajn precipe en la herbejoj; kelkaj specoj estas *H. conicus*, *punicus*, *obrusseus*, *coccineus*, *psittacinus*, k.t.p.. Por la legantoj kiuj konas la latinan lingvon tiuj nomoj memorigas iliajn brilajn kolorojn; ĉiuj estas manĝeblaj specoj sed pro sia malgrandeco kaj ankaŭ pro sia kadukeco (facile ili fariĝas nigraj) ne tre uzataj kiel mangajo.

18. Se via fungo estas destinita al ĉi tiu numero, vi devas konsideri ĉu:

◊ ĝi havas aspekton apartan, dank'al ĉapelo glata, ofte ebenigita, sufiĉe bone kolorata, precipe en roza, sed ankaŭ en viola, oranĝa, dubeverda, musnigra kaj ankaŭ blanketa, kaj ĉu la lamenetaro aspektas densa, unuforma, kun la lamenetoj facile rompeblaj, purblankaj aŭ hele salmkoloraj

iru al la sekvanta n. 19

◊ aŭ ne havas tiajn karakterojn

saltu al la n. 20

19. Se vi fiksis vian fungon al ĉi tiu numero, vi havas *rusulon*, alian gravan grupon de fungoj, ofte renkonteblaj kaj multnombraj. La lamenetoj estas kutime blankaj aŭ kremflavaj, egalaj; la tigo estas samkolora kun la lamenetoj, nur iajfoje, ĉe iuj rozaj specoj, ĝi estas samkolora kun la ĉapelo. Antaŭ ol manĝi rusulon oni devas gustumi malgrandan peceton de la fungo: se la gusto ne estas rimarkinda, vi povas kuiri kaj manĝi ĝin trankvile sed se ĝi estas pika kiel pipro aŭ kapsilo (papriko) aŭ se la fungo odoras malbone, vi ne manĝos ĝin. Neniu rusulo estas opiniata kiel venena, sed kompreneble iuj estas nemanĝeblaj pro sia malbona gusto aŭ odoro. Jen la latina nomo de kelkaj manĝeblaj specoj: *Russula virescens* (ĉapelo verdeta, blankmakulita) kiu estas la plej ŝatata speco kun la *R. aeruginea graminicolor* (ĉapelo unuforme verdeta) kaj la simila *R. integra*; *R. aurata* (ĉapelo oranĝa), *R. cyanoxantha* (ĉapelo violeta aŭ griza) kun la simila *R. vesca*; *R. lepida* (ĉapelo rozruĝa, dubeflava en la centro), *R. delicata* kaj *lactea* (ĉapelo blanka kun evidenta marverda reflekso sur la lamenetaro), k.t.p.; kaj tiu de kelkaj nemanĝeblaj: *Russula foetens* (kun fetora odoro de senviva karno, ĉapelo brunflava, raide striata ĉe la rando) ofte granda, *R. emetica* kaj *rubra* (ĉapelo ruĝa), k.t.p..

20. Se vi atribuis vian fungon al ĉi tiu numero, vi trovas vin antaŭ granda grupo de fungoj de la kvar genroj: *Tricholoma*, *Collybia*, *Mycena* kaj *Marasmius*. Mi kunigis ĉi tiujn blanksporajn genrojn ĉar tri el ili, t. e. *Collybia*, *Mycena* kaj *Marasmius* estas por ni sen graveco pro la kutima malgrandeco kaj la maldikeco de la ĉapelo de siaj specoj (ĉiuj manĝeblaj) kio devigus sufiĉe grandan rikolton por formi manĝeblan porcion, dum la kvara, tiu de la trikolomoj, prezentas multnombrajn specojn. El la tri suprediritaj genroj ni priskribos tamen la plej gravajn el ĉiu: *Marasmius oreades* estas fungeto tute

dubeŭflava kun tigo maldika, kiu troviĝas en la herbejoj en kelkaj ekzempleroj kune, postulante tamen grandan rikolton por ebligri prezenteblian mangaĵon *Mycena pura* estas fungeto tute helviolkolora kun tre maldika tigo kiu similas al trikolomo (*T nudum*) kaj al kurtenaco (*Cortinarium violaceum*) distungebla tamen el ili pro la maldikeco de la tigo kompare kun sia alteco *Collybia veluipes* (kiu signifas kun velura piedo) havas ĉapelon bele brunruĝa kaj la tigon samkolora en ĝia malsupera parto sed flaveta en ĝia supera, apud la ĉapelo, estas ĉi tiu malsupera parto kiu ŝajnas velura, ĉi tiu speco troviĝas, kiel la *Armillaria mellea* (vidu n 11) sur la trunkstumpoj *Collybia acervata* estas tre ofta kaj sensignifa speco kies ĉapelo estas ankaŭ ledflaveta kaj la tigo bruna, kontrastante kun tiu Kiel mi jam diris, ĉiuj ĉi tiuj specoj estas manĝeblaj sed nur granda rikolto ebligas prezenteblian teleron

Male, al la *trikolomoj* apartenas multnombraj specoj, se ankaŭ ne ĉiuj estas sufiĉe oftaj Vere venena ŝajnas esti nur unu, la *Tricholoma tigrinum* (au *pardinum*) sufiĉe facile rekonebla pro la ĉapelo kiu estas malpure blanka-griza kun nigraj veruketoj (el kiuj devenas la nomo de tigrinum = tigrino aŭ pardinum = leopardo), la tigo kaj la lamenoj estas blankaj Ni ne eĉ manĝos tamen la brunruĝĉapelajn *T albobrunneum* kaj *vaccinum*, ĉar ili estas maldolĉaj (Ĉiam gustumu, maĉante ĝin, peceton da fungo, kelkfoje utila provo por elekti inter nevenenaj fungoj! Sed se ankaŭ vi maĉos venenan specon, ne timu, ĉar la kvanto estas tro malgranda por fariĝi danĝera) Ni trovos bonaj la specojn kun la ĉapelo helkolora, t t dubeŭflava, kremkolora ĝis salmkolora, kiel *T georgii*, *T paneolum* kaj *T vinum* Ni povos senĝene manĝi, se ni trovos ĝin sufiĉe abunde, la tute helviolkoloran *T nudum* kiun ni jam citis pro ĝia preskau blanka spordepono, kvankam la lamenoj aspektas violaj Ankaŭ ni povos bone manĝi la belan *T rutilans*, kelkfoje troveblan en sufiĉe grandaj ekzempleroj sed preskau ĉiam izolitaj, ĝia ĉapelo estas kovrata de speco de densa felto de bela purpura ruĝo kiu, kun la aĝo, maldensigas montrante la belan flavan koloron de la karno de la ĉapelo kun la lamenoj, kaj de la tigo El du specoj brile flavaj, la *T equestre* estas bone manĝebla, sed ni rifuzos la similan *T sulphureum* (= sulfura) dank al ĝia evidenta malagrabraodoro de lumiga gaso Fine, inter la trikolomoj kun nigra au preskau nigra ĉapelo, ni elektos la *T portentosum*, troveblan ankaŭ dum la malfrua autuno iafoje frostita, la ĉapelo ne estas ebena sed ofte ondumita, radie striata ĉe la rando kaj la tipa karaktero estas la lamenoj, blankaj sed kun tre hela sed videbla reflekso verdeta

21 Se vi asignis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi devas rigardi ĉu

◁ la tigo ne estas meze de la ĉapelo, t e ĉu la fungo estas malsimetria, iafoje la tigo povas ankaŭ manki iru al la sekvanta n 22

▷ au ĝi estas sufiĉe meze (centro de la lamenoj) saltu al la n 23

22 Se vi destinis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi havas la genron *Pleurotus*, kies specoj estas manĝeblaj, ekz *P ostreatus* *P columbinus* Ĉiuj havas brun-

koloran ĉapelon kaj la lamenetojn helajn, tre laukurantajn laŭlonge la tigo, t e finante sur ĝin, paralele

23 Se vi fiksitis vian fungon al ĉi tiu numero, vi devas rigardi ĉu

◇ la lamenetoj estas densaj, t e multnombraj iru al la sekvanta n 24
~ au maldensaj saltu al la n 25

24. En ĉi tiu kazo vi havas fungon de la genro *Clitocybe*, kies nur kelkaj specoj estas venenaj, se ne mortigaj Ili estas la *C olearia* (iam *Pleurotus olearius*) kiu kreskas sur la maljuna ligno de olivarbo kaj de kverko, havas malpuroranĝan ĉapelon, kaj kiam estas maljuna, ĝiaj lamenetoj ofte fosforeskas Ĝi povas krome esti konfuzata kun la specoj apartenantaj al la genro *Entoloma* (vidu n 30) kies kelkaj specoj estas venenaj, do rifuzindaj

Ankaur venenaj estas la malgrandaj (diametro de la ĉapelo ne pli ol 4 5 centimetroj) blankaj specoj, kiel ekzemple la *C caudicans*, la *rivulosa*, la *dealbata*, k s , estas do pli bone sin deteni de ili Cetere ne konfuzu ilin kun la *Clitopilus prunulus* (vidu n 29) au kun la sekvanta *C nebularis*!

Tre bone manĝebla estas la *C nebularis* (= nebula) tiel nomata pro la griza koloro de la ĉapelo, trovebla ankaur en grandaj ekzempleroj (ĝis 20 cm de ĉapeldiametro) kaj la *C odora* kun la ĉapelo verda griza, neniam trovebla en grandaj ekzempleroj (ne pli ol 5 cm de diametro) kaj odoranta de anizo Iom malmolaj ĉar elastaj estas la *C infundibuliformis* (= funelforma) kaj la *C geotropa* Apartan lokon havas la *C laccata* ĉar sufiĉe malfrue oni faris por ĝi novan genron *Laccaria*, lau aliaj aŭtoroj *Russulopsis* Ĝi estis ĉiam malgranda fungo, ne tre utiligebla, kvankam manĝebla, ĉar tre maldikĉapela, sed ni citos ĝin ĉar ĝiaj lamenetoj estas karakterize maldensaj, kiaj tuuj de la venonta genro *Hygrophorus* Ĝi estas tre ofta speco, facile rekonebla al sia koloro de rozkarno en la tipa vario sed viola en la vario *L amethystina*, ankoraŭ pli ofta La ĉapelo estas neregula kaj ondumata kaj la maldika tigo preskaur ĉiam ne rekta Kutime, al lamenetoj kiuj iras ĝis la tigo, alter niĝas aliaj kiuj de la rando tuuj nuliĝas en la ĉapelo, donante karakterizan aspekton al la lamenetaro

25 En ĉi tiu kazo vi havas fungon de du subgenroj de la genro *Hygrophorus* kies ĉiuj specoj estas manĝeblaj, tuuj de la subgenro *Lsmacium* havas la ĉapelon kaj la tigon viskgluantaj ankaur dum seka vetero, ekzemploj estas *L pudorumus* (= pudora) de bela salmrozokoloro, *L gliocyclus*, *L chrysodon* kaj *L eburneus*, blankflavetaj kaj *L agathosmus*, dubegriza Fine en tuuj de la subgenro *Camarophyllus* la ĉapelo ne estas ebena ekzemplo estas la *C marzuolus* (= marta) kun preskaur nigra ĉapelo

26 Se vi atribuis vian funĝon al ĉi tiu numero (el la n 4, rozkolora spur pulvora depono), vi devas konsideri ĉu

- ◇ ĝi havas vulvon (vidu n 7) iru al la sekvanta n 27
◇ au ne saltu al la n 28
-

27 Se vi asignis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi havas funĝon de la ĝenro *Volvaria* (t e, provizita de vulvo) Ĉiuj specoj estas blankaj au malpurblankaj kaj ĉiuj estas manĝeblaj La ĉefaj estas *V speciosa* *V glotocephala* *V bombycina*

28 Se vi destinis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi devas observi ĉu

- ◇ la lamenoj estas laukurantaj (t e cu ili plilongigaas malalten laulonge la tigo) iru al la sekvanta n 29
◇ au ne saltu al la n 30
-

29 Se vi fiksis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi havas la *Chitopilus prunulus* bone manĝeblan funĝon, blankan kun karakterizaodoro de fresa faruno au pasto, neniam tre grandan

30 Se vi atribuis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi havas la du malfacile apartigeblajn ĝenojn *Pluteus*, ekz *P cervinus* kaj *Entoloma* sed tial ke la dua prezentas venenajn specojn (ekz *E lividum* kiu eĉ estas mortiga), estas pli bone forlasi ĝin

31 Se vi fiksis vian funĝon al ĉi tiu numero (el la n 4, okrasporpulfvora depono) vi devas konsideri ĉu

- ◇ ĝi havas *kurtenon* iru al la sekvanta n 32
◇ au ne saltu al la n 33
-

32 *Kurteno* estas speco de vualo (parta vualo, vidu n 8) similante ofte al araneaĵo, tre bone videbla sur junaj ekzempleroj, kiu de la rando de la ĉapelo iras al la tigo iom pli malalten, tiamaniere ke ĝi aspektas pli malpli klinigita rilate al ĝi Por pli bone kompreni la aspekton de tiu vualo, imagu ĉapelitan virinon de antaŭ duono de jarcento kiam, dezirante ŝirmi sin de la polvo-ekzemple sur tuopoka sentegmenta automobilo ekipis sin per travidebla vualo sur sia larĝgranda ĉapelo kaj malsuprenirigis ĝin ĝis la kolo kie ŝi nodis ĝin anstataŭ la virinan ĉapelon per la funga kaj la virinan kolon per la funga tigo kaj vi havos la aspekton de juna fungo apartenanta al multnombra grupo

de la *Cortinarius* (Kurtenacoj) (vidu bildon 22) Kiam la fungo ne plu estas juna sed bone kreskita, la kurteno ne plu ĉeestas, ĉar falis, lasante sur la tigo postsignon, ĉiam diverskoloran de tiu de la tigo, do videblan, ofte ruĝetan

Se via fungo havas kurtenon, apartenas do al ĉi tiu grupo kiu havas tiom multnombrajn specojn ke oni sentis la bezonon subdividi ĝin en ses subgenroj por faciligi ilian studon La precipa ilia distinga karaktero estas la viskeco de iliaj partoj *Inoloma* kaj *Dermocybe* estas la du subgenroj ne viskecaj kaj kun la ĉapelo seka kaj la kurteno silka au areneaĵa, la unua kun la piedo de la tigo bulba, t e iom ŝvelita (pufa), kies kelkaj specoj estas la *I violaceus* kaj *I alboviolaceus*, kaj la dua kun la piedo normala, kies kelkaj specoj estas *D sanguineus* *D azureus*, *D cinnabarinus*

La tria kaj la kvara subgenroj, la *Hydrocybe* (ne konfuzu kun la *Hygrocybe* kiu estas subgenro de la *Hygrophorus* jam viditaj en la n 17) kaj la *Telamonia*, havas la ĉapelon seka dum seka vetero kaj malseka kun samkondiĉa vetero, sed ne viskeca, la kurteno estas ĉiam silka au areneaĵa, kaj la unua subgenro havas la piedon de la tigo normala kaj la dua bulba, el la unua ni citos nur la *H erythrinus*, el la dua la *T praestans* La kvina subgenro, la *Phlegmacium*, kiu entenas fungojn kun la ĉapelo viskeca, ne nur havas la plej multajn specojn sed iliaj fungoj estas la plej abundaj, jen kelkaj specoj *P multiformis* *P orichalceus*, *P varius* *P percomis*, ĉiuj kun la ĉapelo de bela flavkoloro sed la tri unuaj kun la piedo de la tigo bulba kaj la kvara ne La kurteno estas en tiu subgenro, akorde kun la partoj de la fungo, viskeca sur la ĉapelo kaj araneaĵa kaj seka sur la tigo La sesa subgenro fine estas la *Myxactum* en kiu la fungoj estas tute viskecaj, entenata la kurteno, el ili ni citos nur la *M collinitus* Kiel vi povas konstati, la distingo de la ses subgenroj ne estos facila afero se vi rikoltos la fungojn kun malseka vetero, sed notu bone ke se neni *Cortinarius* estas venena, ŝajnas tamen ke tre malmultaj specoj estas ŝatataj kiel manĝaĵo provu do senĝene, kaj eble inter la specoj vi trovos iujn bon kvalitaj, ĉar ĉi tiu genro estas anko'au malmulte konata sub la nutra vidpunkto, bonmerita estos tiu kiu, signalante la specon, kontribuos al la scienco

33 Se via fungo ne havas kurtenon, vi devas observi ĉu

◇ ĝia tigo havas kolrigon (vidu n 6)

iru al sekvanta n 34

◇ au ne

saltu al la n 35

34 Se via fungo havas kolrigon (kolumon) kiu situas sufiĉe alte sur la tigo, vi havas fungon de la genro *Pholiota*, kies ĉiuj specoj estas manĝeblaj precipa la *P caperata*, tre bone rekonebla Apartan aspekton havas la *P squarrosa* brunruĝa kun abundaj samkoloraj skvamoj

35 Se via fungo ne havas kolrigon oni devas observi ĉu

◇ la lamenetoj estas bone laukurantaj (vidu n 28) longe de la tigo

iru al la sekvanta n 36

◇ au ne

saltu al la n 37

36. Se la lamenetoj estas laŭkurantaj, vi havas fungon de la genro *Paxillus* kies specoj estas manĝeblaj kvankam sufiĉe malmolaj, postulantaj do longan kuiradon. Unu el la plej konataj specoj estas la *P. atrotomentosus* bone rekonsebla per la nigra velura piedo. Aliaj estas la *P. involutus*, brunruĝĉapela kaj la *P. giganteus* kun tre dika tigo kaj malgranda ĉapelo.

37. Se la lamenetoj ĉesas abrupte sur la tigo, vi havas fungon de la du genroj *Inocybe* kaj *Hebeloma*; tiuj de ĉi tiu lasta genro estas manĝeblaj sed tial ke inter tiuj de la unua estas pluraj venenaj, estas pli bone ne manĝi ilin.

38. Se vi atribuis vian fungon al ĉi tiu numero (viola sporpulvora depono el la n. 4), vi devas konsideri ĉu:

◊ la tigo havas kolrington

iru al la sekvanta n. 39

◊ aŭ ne

saltu al la n. 40

39. Se la tigo portas kolrington (kiu estas sufiĉe alta sur la tigo), vi estas antaŭ fungoj de la du genroj *Psalliota* kaj *Stropharia*; la unua estas unu el la plej gravaj fungaj genroj kaj la unika kiu povis ĝis nun esti kulturata en keloj, precipe en la suda parto de Francujo. Ĝiaj specoj estas similaj inter si, ĉiam blankaj aŭ dubeblankaj, ofte grandaj kaj ĉiuj bone manĝeblaj kaj ŝatataj, precipe la *P. campestris* (kampa), la «champignon» de la francaj, per kiu vorto ili indikas ankaŭ ĉiujn fungojn ĝenerale. Ilia lamenetaro estas bele rozkolora en la juneco, fariĝante preskaŭ nigra en la plenkreskitaj ekzempleroj.

La dua genro (*Stropharia*) multe malpli grava, ampleksas kelkajn malgrandajn specojn koloritajn, el kiuj la plej karakterizan estas la *S. aeruginosa*, unu el la tre malmultaj fungoj verdaj-blauaj. Ilia kolringo estas ofte nur signita kaj tiel ke inter ili estas suspektaj specoj, estas pli bone sin deteni de ilia manĝado.

40. Se la tigo ne havas kolrington, vi estas antaŭ fungo de la genro *Hypoholoma*; la du ĉefaj specoj estas la *H. fasciculare*, flava kaj *H. sublateritium*, flava-bruna; ambaŭ estas maldolĉaj (la unua pli ol la dua) kaj suspektaj, do decas ne manĝi ilin: domage!, ĉar oni trovas ilin ofte kaj en belaj grupoj (ĉiam sur trunkstumpoj en la tero) kiuj ebligas abundan rikolton!

41. Se vi asignis vian fungon al ĉi tiu numero (nigra depono de sporpulvoro, el la n. 4) vi devas observi ĉu:

◊ la lamenetoj estas laŭkurantaj (legu n. 28)

iru al la sekvanta n. 42

◊ aŭ ne

saltu al la n. 43

42. Se la lamenetoj finas sur la tigo malproksime de la ĉapelo, vi havas la genron *Gomphidius*, kies du ĉefaj specoj estas *G. glutinosus*, tre bone rekonsebla per la haŭteto (alia aspekto de la parta vualo, vidu n. 8), kiu situas kiel la kurteno de la *Cortinarius* (vidu n. 32), estante tamen diafana kaj travidebla kiel celofano (sed nur ĉe la junaj individuoj, ĉar poste ĝi falas) kaj per la flava piedo. La dua speco estas la *G. viscidus* (= viskeca) kiu estas tute brunruĝa, ledkolora. Ambaŭ estas bone manĝeblaj, kompreneble se ne tro maljunaj.

43. Se vi destinis vian fungon al ĉi tiu numero, vi estas antaŭ la genro *Coprinus*, bone distingebla ĉar ĝia ĉapelo, kiam juna, estas antaŭe ovoforma kaj poste iomete kampanul- aŭ sonorilforma; apenaŭ plenkreska, ĝi jam disfalas en speco de nigra inko (fakte oni provis fari per ĝi inkon) produktante per la tuta fungo, nigran buljonon. Ĉiuj specoj de *Coprinus* estas manĝeblaj nur kiam junaj, t. e. kiam la lamenetoj estas blankaj aŭ rozkoloraj aŭ apenaŭ helviolaj, sed ne tuj kiam komenciĝas la disfalo. La plej konataj specoj estas *C. comatus* (= *porcellanus*) blanka kiam juna kaj kun la ĉapelo tre longigita, kaj *C. atramentarius* kun la ĉapelo griz-flava. Ambaŭ havas sur la ĉapelo karakterizajn skvamojn.

44. Se vi fiksas vian fungon al ĉi tiu numero (el la n. 3), vi havas ekzempleron de grupo de specialaj fungoj ĉe kiuj la lamenetoj, kiuj estas ĉiam pli malpli laŭkurantaj longe de la tigo, aspektas kiel falditaj, do pli dikaj kaj kunligitaj la unuaj kun la aliaj per aliaj faldoj, aspektante reliefaĵajn vejnojn. La plej konata speco estas la *Cantharellus cibarius* (kantarelo) tuta de bela ovo-flava koloro (fakte ĝia nomo estas, en la germana lingvo Eierpilz), kiu bone kontrastas kun la verda musko meze de kiu estas ofte trovebla. Ĝi estas bone manĝebla speco, tamen oni devas kuir ĝin sufiĉe longtempe ĉar la pulpo povas esti sufiĉe malmola. Bona distinga karaktero estas krome ĝiaodoro de frukto, preskaŭ de abrikoto.

Alia speco de ĉi tiu grupo estas la *Craterellus cornucopioides*, kiu havas strangan aspekton: kurba funelforma (kiel ĉaskorno aŭ korno de abundeco) kun la pinto enigita en la tero grizkolora ekstere, kie la faldoj estas preskaŭ nevideblaj, preskaŭ nigra interne; malgraŭ ĝia ne tre invitanta aspekto, kiu donigis al ĝi la vulgaran nomon de « trumpeto de la mortinto » (Tottrumpete en la germana lingvo), ĝi estas bone manĝebla speco, tre aroma; jam seka origine, oni povas elsekigi kaj mueli ĝin, akirante aroman pulvoron tre taŭgan kiel spicaĵo. Neniu speco de ĉi tiu grupo estas venena kaj ĉiuj estas manĝeblaj kondiĉe ke oni kuiru ilin bone.

45. Se vi atribuis vian fungon al ĉi tiu numero (el la n. 2) vi estas antaŭ la granda grupo de la *poliporacoj* kiuj, en sia genro *Boletus*, entenas la reĝon de ĉiuj fungoj, la *Boletus edulis*, la plej konata kaj ŝatata fungo en ĉiuj landoj kie oni konsumas ĝin.

Por la rekono de la plej interesaj specoj, ni devas antaŭ ĉio dividi la grupon en la du precipaj genroj *Polyporus* kaj *Boletus*. La unua prezentas fungojn neniam tre regule formataj en tigo kaj ĉapelo kaj kun la malsupra supraĵo de la ĉapelo kun la truetoj tiom malgrandaj kaj proksimigitaj la unuajn al la altaj ke preskaŭ oni ne povas rekoni ilin, la dua prezentas ĉiam tre regule formatajn fungojn, t.e. kun tigo kaj ĉapelo bone apartigitaj kaj la truetoj bone videblaj se ankau ne ĉiam rondaj

◇ Por la *Polyporus*

iru al la sekvanta n. 46

◇ por la *Boletus*

saltu al la n. 47

46 Antaŭdirite ke neniu poliporo estas venena, mi tuj diras ke tre malmultaj specoj estas manĝeblaj ĉar la plej ofte ili estas lignaj au malmolaj au korkaj, la specoj, kiujn oni povas manĝi, estas la *P. ovinus*, blanketa, la *P. umbellatus* bruna kaj la *P. confluens*, bruna flava. Ĉiuj estas troveblaj en kunigitaj grupoj, ĉiuj havas la ĉapelon tre neregule formata kaj oni povas manĝi ilin nur se junaj kaj do molaj

47 En la grava genro *Boletus* ni tuj apartigu la du specojn kiuj pli interesas al ni ĉar la unua, la *B. edulis* (signifas manĝebla) estas, kiel mi jam diris, la reĝo de la fungoj, kaj la dua, la *B. satanas* (aluda nomo!) estas la sola speco de *Boletus* kiu estas taksata kiel venena (ne mortiga), kvankam duba. Ambaŭ havas, precipe kiam estas junaj, la tigon tre dika, precipe meze de sia alteco, similtanta pro tio bareleton. La maksimuma diametro de la tigo povas ifoje egali tiun de la ĉapelo au eĉ superi ĝin, donante do strangan aspekton al la fungo, similan al karikaturo de grasega homo kun malgranda ĉapelo, ankau se la tigo, sur kiu ne ekzistas kolringo, ne estas larĝa kiel la ĉapelo, estas tre kompakta kaj ne fibra, utiligebla do kune kun la ĉapelo manĝebla. Kaj nun jen la malsimilaj inter la du specoj: sur la dika tigo *B. edulis* havas blankan reton, dum ĝi estas ruĝa sur *B. satanas*, *B. edulis* havas la ĉapelon de variaj brunoj plej ofte malhelaj, dum *B. satanas* havas ĝin tre hela, preskaŭ duba blanka, la regiono de la trueto sub la ĉapelo estas blanketa ĉe la junaj *B. edulis* kaj dubeverda ĉe la plenkreskaj, sed ruĝa ĉe *B. satanas*, la pulpo de *B. edulis* estas blanka kaj *restas tuta* tuj post la rompo de la ĉapelo au de la tigo, tiu de *B. satanas*, unue blanketa au flaveta, fariĝas dubeblua au griz-violeta tuj post la rompo

Apartigitaj la du suprediritaj ĉefaj specoj, rigardu ĉu

> la tigo havas kolringon

iru al la sekvanta n. 48

> au ne

saltu al la n. 49

48 Tri estas la ĉefaj specoj de *Boletus* provizitaj de kolringo (resto de la parta vualo): *B. elegans* kun la ĉapelo orflava ĝis orangflava, *B. luteus* kun la ĉapelo intense bruna kaj *B. viscidus* kun la ĉapelo grizbruna. Kompreneble ĉiuj tri

estas manĝeblaj sed *B luteus*, kiun oni trovas en la ebenaĵo sub la pinoj, estas la plej bona, orde sekvata de *B elegans* kaj *B viscidus* (la latina nomo ne influu, ĉar la speco havas la ĉapelon viskeca nur kun pluva vetero), kiujn oni trovas sur la montoj precipe en la regiono de la larikoj

49 La specojn de *Boletus* ne provizitaj de kolringo ni povas dividi en du grupoj en la unua la truetaro ĉesas renkontante la tigon kaj eĉ en tiu punkto formas cirklan kavon au kanaleton ĉirkaŭ ĝi, ĝi estas do la ĉera de la tigo

> por ĉi tiuj iru al la sekvanta n 50

< en la dua grupo la truetaro daurigas iomete laulonge la tigo au ĉiel aliĝas al ĝi, kaj por ĉi tiuj saltu al la n 51

50 Du specoj de ĉi tiu grupo estas tuj rekoneblaj ĉar ili havas la tigon mal kulita per nigraj eroj sur grizblanketa fono *B rufus* havas ĉapelon brik ruĝa, *B scaber* havas ĝin terbruna. Ambaŭ ĉi tiuj specoj estas oftaj sur la merkatoj, bone konataj kaj bone manĝeblaj, ilia aspekto estas karakteriza pro la tigo sufiĉe longa kaj la ĉapelo dika, duonsfera. Du aliaj specoj de ĉi tiu grupo estas tuj rekoneblaj pro la gusto se peceto da ili estas tre maldolĉa, vi havas *B pachipus*, kutime diktigan au *B felleus* (kiu signifas maldolĉa), ambau ne estas venenaj sed do nemanĝeblaj ĉar maldolĉaj. *B luridus* estas speco kiu, malgrau sia latina iomete forpuŝanta nomo (kiu signifas malpurega) estis reko nata kiel bone manĝebla (la aŭtoro de ĉi tiu libreto faris li mem la provon), ĉi tio montras ke la nominto taksis ĝin venena kaj k'arigas la fakton ke pluraj specoj estas ankoraŭ hodiaŭ suspektaj rilate ilia manĝebleco. Oni trovas sufiĉe ofte grandajn ekzemplerojn de ĉi tiu speco, t e kun ĉapelo de 10-15 cm diametre, la koloro de la ĉapelo estas variema, olivflava au olivbruna, iufoje brikruĝa sed iam kun dubeverda reflekso, kune kun aliaj specoj, kiel ekzemple *B minutoporus*, ĝia pulpo fariĝas tuj blua je la rompo memoru bone ke ĉiuj specoj de *Boletus* kun ĉi tiu karakterizo estas tamen bone manĝeblaj. *B badius* kiu similas al *B edulis*, ne havante tamen la tigon tiom dika kaj estante ĉiam en ekzempleroj pli malgrandaj, havas la pulpon blanka kaj estas bone manĝebla

51 Kun la pulpo flava estas la specoj *B chrysenteron*, kiu havas kutime la ĉapelon fendita supraĵe kaj la tigon ruĝa kaj nereĉka, kaj *B subtomentosus* kun la ĉapelo iomete veluran, ambau bone manĝeblaj. *B granulatus* ankaŭ bone manĝebla, estas facile rekonebla ĉar el sia truetaro gutas blankaj gutetoj, la pulpo estas preskaŭ blanka kaj la ĉapelo sufiĉe intense bruna, kaj fine la *B bovinus* kun la truetoj neregule rondaj kaj la ĉapelo ledkolora, speco tre ofta kaj vulgara, manĝebla sed ne delikata ĉar la pulpo kuirita fariĝas iomete viskeca

52. Ne multnombra estas la familio de la *Hidnacoj* al kiu vi saltis el la tria eleco de la n. 2. La du ĉefaj kaj pli oftaj specoj de ĉi tiu grupo estas bone distingeblaj kaj apartigeblaj unu de la alia: *Hydnum imbricatum*, iufoje en tre grandaj ekzempleroj (ĝis 30 cm. de diametro de la ĉapelo) estas kompakta, malmola fungo kun la ĉapelo malhela violbruna kaj multaj kaj grandaj skvamoj sur ĝi, iomete pli malhelaj; la dornetaro estas griza. *H. repandum*, neniam en grandaj ekzempleroj, estas tute flava ĝis rozeta, iomete salmkolora; ambaŭ specoj havas la ĉapelon preskaŭ ĉiam ne regule randa aŭ duonsfera kiam junaj, kaj kiam ili estas plenkreskaj, ĝi prenas volonte funelformon pli malpli profundan. Ambaŭ estas bone manĝeblaj, sed la unua havas tre fortan guston kaj pro tio, oni faras el ĝi, sekigita kaj muelita, aroman pulvoron, uzeblan kiel spicaĵon. La dua speco havas, male, delikatan guston.

53. Se vi atribuis vian fungon al ĉi tiu numero (el la n. 1) vi devas vidi ĉu:

- ◊ la ĉapelo estas spongforma iru al la sekvanta n. 54
 - ◊ aŭ oreforma saltu al la n. 57
-

54. Se vi asignis vian fungon al ĉi tiu numero, vi devas konstati ĉu:

- ◊ la malsupra rando de la ĉapelo estas tute kunigita kun la tigo iru al la sekvanta n. 55
 - ◊ aŭ tiu rando estas libera tiamaniere ke la ĉapelo kuŝas sur la tigo kiel estingilo saltu al la n. 56
- Ĉiuj specoj de ĉi tiu grupo estas printempaj.
-

55. Se la formo de la spongo estas sufiĉe konusa, vi havas la *Morchella conica* kaj la *M. elata*, ambaŭ bone manĝeblaj, kompreneble post bona kaj diligenta purado kaj lavado de la fungoj ĉar eroj da sablo aŭ tero povas resti en la kavarnetoj de la spongo. Se tiu formo estas pli sfera, oni havas la *Morchella esculenta* (kiu signifas bongusta). Valoras la samaj avertoj de la antaŭaj.

56. Se vi alvenis al ĉi tiu numero, vi havas la genron *Mitrophora* se la ĉapelo estas bone kunigata al la tigo per sia tuta supra duono, ankaŭ se sia malsupra rando estas libera, kaj la genron *Verpa* se la ĉapelo estas, kiel mi jam diris, kunigata al la ĉapelo nur per sia supra parto preskaŭ surmetita kiel kloŝo. Ambaŭ genroj entenas kelkajn diferencajn specojn, ĉiuj manĝeblajn kiel la morkeloj (*Morchella*) (vidu la antaŭan numeron).

57. Se vi asignis vian funĝon al ĉi tiu numero, vi devas konsideri ĉu:

- ◊ la ĉapelo kuŝas sur la tigo kiel ĉapeto kaj estas iomete selforma aŭ oreelforma iru al la sekvanta n. 58
 - ◊ aŭ ĝi estas sufiĉe sferforma sed kun la aspekto de cerbo saltu al la n. 59
-

58. Se vi alvenis al ĉi tiu numero, vi havas funĝon de la genro *Helvella* (helvelo), kies ne multnombraj specoj estas ĉiuj bone manĝeblaj, kondiĉe ke oni kuiru ilin ĉar ili entenas venenan substancon, la helvelinon, kiu estante solvebla en varma akvo kaj malaperanta kun la sekiĝo, permesas manĝi la funĝon kuirita freŝa aŭ pli bone sekiĝita, sed ne kruda.

59. Se vi alvenis al ĉi tiu numero, oni havas la specon *Giromitra esculenta*, kiu, malgraŭ sia nomo (esculenta signifas manĝebla, bongusta), estas, kiel la helveloj (vidu la antaŭan numeron) evitenda se kruda, ĉar la ĉeesto en ĝi de la samaj substancoj de la helveloj, malpermesas manĝi ĝin kruda. Jen kontraŭa ekzemplo al tiu de *Boletus luridus* (vidu n. 50): tie, speco opiniita venena kiu estas bone manĝebla, ĉi tie, speco opiniita manĝebla, kiu povas estis venena.

60. Se vi fiksitis vian funĝon al ĉi tiu numero (el la n. 1) vi estas antaŭ funĝo de la genro *Clavaria* (klavariacoj) kies estas pluraj specoj varie koloraj: flavaj (*C. flava*, *aurea*, *formosa*), grizaj kaj blankaj kun la ekstremo rozaj (*C. botrytis*). Ili estas troveblaj iufoje en fasketoj de sufiĉe granda amplekso kies bazo estas tamen unusola. Ĉiuj specoj estas manĝeblaj se junaj kaj bone purigitaj ĉar, kiel por la morkeloj (vidu n. 55), malpuraĵoj povas resti inter la branĉoj de tiu speco de vegetala koralo. La unika speco kiu apartiĝas kiel aspekto estas la *Calocera viscosa* pro sia malgrandeco (maksimume 8 cm. de alteco) sia simpleco (unu aŭ pluraj branĉetoj elirantaj direkte de la grundo) kaj la koloro kiu estas intense ruĝoranĝa; ne venena sed nemanĝebla pro sia malgrandeco kaj sia malofteco.

61. Se vi destinis vian funĝon al ĉi tiu numero vi devas konstati ĉu:

- ◊ ĝia formo estas prefere sfera iru al la sekvanta n. 62
 - ◊ aŭ pira saltu al la n. 63
 - ◊ aŭ klabaj saltu al la n. 64
-

62. Se vi alvenis al ĉi tiu numero, vi estas antaŭ la genro *Lycoperdon* (ankaŭ nomata *Bovista*) kiu entenas blankajn funĝojn kiuj similas pilkojn, kuŝantajn sur la grundo kaj fiksitajn al ĝi per speco de malgranda radiketo. Ilia grandeco estas tre variebla: de tiu de nukso aŭ avelo ĝis tiu de infankapo. Kiam ili

estas junaj, blankaj en la tuta interno, ili estas manĝeblaj ankaŭ krudaj, sed se ili estas iomete pli aĝaj, la interna blankaĵo fariĝas malpura dubeverda ŝlimo kaj poste velura amaso plenplena de bruna nepalpebla pulvoro kiu estas la sporaro kaj kiu povas esti elirigata kiel fumo el ekzistanta truo, premante la fungon korpon. Kompreneble en ĉi tiuj du statoj ili ne estas manĝeblaj. Du kutimaj specoj estas: *Bovista nigrescens* kaj *Lycoperdon coelatum*. Al alia genro *Scleroderma* (kiu signifas: kun la haŭto malmola) apartenas aliaj specoj kiuj havas la ŝelon pli malmola ol la *Lycoperdon* kaj kutime verukata; kompreneble ili ne estas manĝeblaj sen esti venenaj.

63. Al ĉi tiu grupo apartenas aliaj specoj de *Lycoperdon* (*L. piriforme*, *gemmatum*, *echinatum*, *saccatum*) kiuj kuŝas sur la grundo per speco de dika kaj malmola tigo. Por ilia manĝebleco, vidu la antaŭan numeron 62.

64. Al ĉi tiu numero apartenas nur la *Clavaria pistillaris*, klabforma, de alteco ĝis 15 cm., flava aŭ dubeblava, manĝebla se juna.

65. Al ĉi tiu numero apartenas la trufoj, t. e. la subteraj fungoj, preskaŭ ĉiuj de la sola genro *Tuber*. Ĉi tiu trompa nomo estis donata pro la similo de ĉi tiuj fungoj al tuberoj, kiel ekzemple la terpomoj, kiuj estas dikiĝo de la radikoj de plantoj, sed estu bone klarigata la fakto ke la trufoj estas specialaj fungoj sed ne tuberoj. Neniu inter ili estas venena (nur kelkaj tre maloftaj specoj estas tiaj) sed ilia valoro el la manĝebla vidpunkto estas tre diversa. Tiurilate estu tuj bone konata la fakto ke la trufojn oni uzas kiel manĝaĵon prefere pro ilia aromo kiun ili komunikas al la aliaj manĝaĵoj, ol pro ilia gusto. La plej ŝatata speco estas nediskuteble la *Tuber magnatum* (signifas: de la magnatoj) precipe pro sia bonodoro kiu igas ĝin unu el la plej famaj spicoj por variaj manĝaĵoj. Kompreneble ĉi tio okazas precipe en ĝia hejmlando, kiu estas Piedmonte, nord-okcidenta itala regiono, kaj pli precize la regiono de Alba, urbo kiu estas fama ankaŭ pro siaj vinoj. Tavole tranĉitaj krudaj en maldikegaj tavoloj per speciala tranĉilo, kaj ŝutataj sur ne fluidaj manĝaĵoj kiel verda salato, ovaĵoj, rizo, makaronoj kaj aliaj sekigitaj pastoj, k. t. p., sed precipe sur la tipa manĝaĵo de tiu regiono kiu estas fandita fromaĝo (itale *fonduta*, kiu signifas ja fandita), ĉi tiuj trufoj donas al manĝaĵo tre bonan odoron, mi preskaŭ dirus parfumon, kiun ĉiuj devus provi: sufiĉu ĉi tie diri ke la fama franco Brillat-Savarin, nediskuteble superjuĝanto pri gastronomio, difinis ilin: la diamanto de la kuirarto. Oni trovas ilin 10-15 centimetrojn sub la tersurfaco, piede de specialaj arboj kiel kverkoj, k. t. p., kaj porkoj kaj hundoj estas speciale kutimitaj trovi ilin per flaro. Ilia aspekto estas preskaŭ de ŝtono aŭ ŝtoneto griza aŭ sekterkolora; ilia grandeco povas iri de tiu de nukseto (pli malgrandaj ne taŭgas rikolti) ĝis tiu de infankapo, sed ju pli pliĝas la grandeco, des pli ĝia formo fariĝas neregula: el preskaŭ ronda ŝtoneto oni povas iri al neregula formo kiel okazas por la tomatoj; la interno devas esti kompakta, sufiĉe malmola, helterkolora, delikate marmorigita pli hele.

Certe malsupera rilate la bonodoro kaj tamen ankoraŭ tre ŝatata speco, precipe en Francujo, estas la *Tuber melanosporum* kiun oni nomas kutime trufo de la Périgord (franca regiono, oriente de Bordeaux); ekstere kaj interne ĝi estas nigra kaj la interno estas ankaŭ marmorigita; tamen ĝiaodoro estas multe malpli intensa kaj delikata. Oni uzas ĝin en diversaj manĝaĵoj, ekzemple en la galantino. Aliaj specoj de trufoj estas vendataj sur la merkatoj sed ili devus esti ĉiam deklarataj kiel surogatoj de la du antaŭaj: *Tuber Borchii* (laŭ aliaj aŭtoroj *Choeromyces meandriformis*) por la unua, kaj *T. aestivum* kaj *T. brumale* por la dua. Ilia distingo de la respektivaj modeloj ne estas simpla: nur la intenseco kaj la boneco de iliaodoro, ĉiam pli grandaj en la modeloj, kune kun la praktiko de ilia manuzado permesas distingi ilin. La *T. aestivum* estas distingebla de la *T. brumale* ĉar ĝi estas pli profunde nigra kaj siaj verukoj estas pli elstarantaj, piramidaj.

66. En ĉi tiu lasta numero mi kolektis plurajn specojn de fungoj apartenantajn al diversaj grupoj, sed tre evidente malsimilajn inter si kaj kun la aliaj jam konsideritaj, tiel ke neniu dubo povas fondi por ilia determino. Ceteremalmultaj el ili estas kuŭme manĝataj kaj mi parolas pri ili ĉi tie, preskaŭ nur pro ilia strangeco.

La *Sparassis crispa* de la grupo de la clavariacoj aspektas florbrasikon aŭ tripon: de tiuj manĝaĵoj ĝi havas la koloron, dubebblankan aŭ flavetan, kaj la grandecon, kiu povas atingi 35-40 cm. Se juna oni taksas ĝin kiel tre bongusta.

La *Fistulina hepatica* de la grupo de la poliporacoj, kies vulgara nomo estas longo de bovo, similas efektive al ĝi kaj al hepato, estante ruĝa, mola, iomete gelatena, sen tigo, kaj trovebla, horizontale elstaranta, sur la trunko de kverkoj kaj kastanarboj. Se juna estas manĝebla ankaŭ kruda.

La *Guepinia rufa* (aŭ *Gyrocephalus rufus*) sufiĉe similas al orelo kiel konsisto kaj formo, se ne kiel koloro, estante prefere ruĝoranĝa ĝis karnruĝa. Oni trovas ĝin meze de la monta musko. Oni manĝas ĝin kruda kiel salato.

La *Geaster stellatus* estas kurioza fungo, nemanĝebla ĉar nature seka, sed ĝuste pro tio, konservebla kiel ornamo. Apartenante al la grupo de la likoperdoj (vidu n. 62) ĝi estus pilketo kun du haŭtoj, unu interne de la alia, sed la unua, la ekstera, iomete membrana, fendiga en pluraj sektoroj kiuj, diverĝante, formas stelon, dum la interna haŭto restas pilkforma; je matureco, ĉi lasta truiĝas per malgranda centra aperturo per kiu fugas la sporoj kiel bruna nepalpebla pulvoro, kiel okazas por la aliaj likoperdacoj. Ĝusta estas do la latina nomo ĉar *Geaster* signifas: stelo de tero. Fakte oni trovas ĉi tiun strangan fungon sur la grundo en la arbaroj.

Por reprezenti al si la *Clathrus cancellatus* oni devas imagi reton, sed kun tre malmultaj masoj, kiel tiuj kiuj entenas balonetojn ŝvelitajn per lumiga gaso, kiel infanludilo. Tiu reteto estas de brila ruĝa koloro kaj de grandeco de nukso povas atingi tiun de pomo. Nekonfuzebla distinga karaktero estas la terura putraodoro de malbonigita viando.

Multajn aliajn strangajn fungojn oni povus citi en ĉi tiu numero, kiel

ekzemple la grupo de la pezizacoj, pelvetformaj, sed aù pro ilia malofteco aù prefero pro ilia nemangebleco, ni detenos nin. Unu specon tamen ankoraù ni priskribos pro ĝia strangeco.

Ĝia latina nomo estas *Phallus impudicus*, kaj tiuj kiuj konas la latinan aù la grekan lingvojn, povos klarigi al si tiun nomon ĉar ĝi iomete similas viran penison. Tiu simileco eksplikos al ni la fakton ke ĉi tiu natura strangaĵo estis jam konata de la plej antikvaj popoloj: fakte sian lokon ĝi povas havi en la kultura historio de la homaro; la antikvaj grekoj konis ĝin kaj al ĝi tributis dian kulton, ankaù pro ĝia mistere rapida kresko. Al la diino Cereso, protektantino de la fekundeco, tiaj fungoj estis ĉiujare deponataj sur la altarojn dum solenaj procesioj. Ĝi estis konata ankaù de la Romanoj, kaj la Germanoj preparis filtrajn trinkaĵojn per ĝia «ovo». Eĉ la medicino kaptis ĝin por prepari medikamentojn kiuj nuntempe estas eble misuzataj.

La fungo eliĝas el la grundo kiel ovo, la tiel dirita «ovo de la diablo aù de la sorĉistintoj», fakte tre simila al kokinovo. Kiel okazas por la ovoflavo en sia ovblankaĵo, la fungo estas ĉirkaùata en juneco de gelatena kovraĵo, kiu estas protektata ekstere de dika blanka haùto, kiel ovŝelo. En la suba parto ekzistas speco de malgranda radiko. Post iu tempo la vulvo (vidu n. 7) fendiĝas je la supera parto kaj la fungo eliras nerezisteble. Ĝia kresko estas tiom rapida ke post unu horo ĝi povas jam havi sian plenan staturon de 10 aù 15 centimetroj (ankaù plie). La ĉapelo kuŝas libera sur la tigo kaj estas kovrata de verda-nigra muko (entenanta la sporojn) kiu emanis teruran putran odoron. Fakte ĝi gastigas muŝojn amantajn tiujn substancojn, kiuj per siaj piedoj dissendas la sporojn. Sen muko, la ĉapelo aspektas tiun de la morkeloj (vidu n. 55) dubblanka, aù griza aù bruneta. La tigo estas interne malplena, do malforta, purblanka, plenplena de truetoj. Nur kiam juna, t. e. ovoforma, ĉi tiu fungo estas mangebla.

ALDONO

RIKOLTO KAJ MANĜADO

Tempo por la rikolto. - La plej bona periodo por la rikolto de la fungoj povas iri de la monato de marto ĝis novembro en la sufiĉe varmaj landoj (mediteranea baseno), sed mallarĝiĝas al tri someraj monatoj, julio, aŭgusto kaj septembro en la nordaj eŭropaj landoj. Tamen ankaŭ en la sudaj, krom iuj printempaj specoj (tiuĵ de la n. 55 kaj sekvantaj — spongformaj — kaj kelkaj aliaj, kiel ekzemple la *Hygrophorus marzuolus* = marta, vidu n. 25) la plej taŭga rikolt-periodo iras de junio ĝis oktobro, kun orda pliigo al la lasta nomata monato, kvankam ankoraŭ en novembro oni povas rikolti malfrujajn specojn kaj ĝis decembro, kiam oni povas trovi ekzemple, kiel mi jam diris, la *Tricholoma portentosum*, iomete frostita.

La kvalitoj de la fungoj kiam oni rikoltas ilin, povas multe varii pro la kondiĉoj de la vetero, precipe rilate al ĝia sekeco aŭ malsekeco. Kompreneble, se oni rikoltas fungojn tuj post la pluvo, oni trovas ilin tre malsekaj kaj tiam la ĉapelo povas rezulti tre viskeca, ankaŭ se, kiam malseka, ĝi ne estas tia. Kun kelkaj esceptoj (vidu la *Hygrophorus*, n. 25) ni ne vokis do la viskecon kiel taŭga distingkaraktero de la specoj.

Resume, se la vetero prezentas malvarman venton, ni serĉos la fungojn en lokoj ŝirmataj de ĝi, kaj eble sunigataj (t. e. turnitaj al sudo); se la vetero estas varma kaj seka, ni serĉos la fungojn en lokoj eble malsekaj, t. e. norde; fine, se post la pluvo venas la suno, ni havos la plej bonajn kondiĉojn por trovi niajn kriptogamojn. Cetere, por la detalaj lokoj, utilos la praktiko de la serĉanto.

Jen la kialo pro kiu la fungojn oni trovas dum iuj jaroj pli abunde ol dum aliaj: ne ĉiam rezultas la ĝusta kombino de la veteraj kondiĉoj, t. e. de temperaturo, de malsekeco, eble de aerpremo, k. t. p..

Odoro de la fungoj. - Krom iuj specoj, kiuj havas karakterizan

odoron fungan, kai kiuj pro tio estas la reĝoj inter la fungoj, kiel ekzemple la *Boletus edulis*, kaj aliaj kiuj havas apartan odoron (de anizo, abrikoto, faruno, k. t. p.) multaj aliaj specoj ne havas apartan odoron estante tamen manĝindaj ĉar bonan odoron oni povas akiri por ili per spikaĵoj kiujn oni uzas por prepari la manĝaĵon. Ankaŭ aliajn specojn kiuj ne havas tre bonan odoron, kiel ekzemple ĉiujn kiuj odoras simile al kalcia klorido (la kemia kombino kiu kun akvo formas acetilenon) aŭ al akvomelono, oni povas tre bone manĝi ĉar ili perdas tiun odoron per la kuirado. Karakteriza odoro permesas certe certan distingon, kiel ekzemple por la trufoj, kaj estas tre konsilebla afero noti ĝin, kune kun la gusto de peceto kruda, kiam oni rikoltas nekonatan specon.

Manĝado. - Por manĝi la fungojn, necesas antaŭ ĉio ke ili estu puraj, senigitaj do de iu ajn terero aŭ de aliaj fremdaj eroj: iufoje oni trovas ilin jam tre puraj; alie oni devas purigi ilin sed oni klopodu uzi kiom eble malpli da akvo; ili jam entenas almenaŭ la 70-75% de akvo, kiu foriras dum la kuirado, helpante tamen ĝin.

La fungojn oni povas manĝi ankaŭ krudaj, sed nur kelkajn specojn, kiel ekzemple la *Lycoperdon* (vidu n. 62); oni manĝas ilin kiel salaton, t. e. tranĉitajn en malgrandaj pecetoj; aŭ tranĉaĵoj kaj spicitajn per oleo, salo, vinagro kaj pipro. Sed kutime oni manĝas ilin kuiritaj.

Ili povas esti freŝaj aŭ sekigitaj.

Oni povas kalkuli ke la sekigita fungo, perdinte sian akvon, reduktis sian pezon al dekono (do unu kilogramo de freŝaj fungoj donas proksimume unu hektogramon de sekigitaj) sed akiris la dekoblon de la koncentriĝo de siaj substancoj kaj se ĝi entenis el ili venenajn, la dekono de la fungo havas la saman efikon de la freŝa: oni diras ke unu hektogramo de la venenega *Amanita phalloides* sufiĉas por mortigi, do dek gramoj, kiu estas malgranda kvanto, de ĝi sekigita sufiĉas samcele.

Por sekigi la fungojn oni tranĉas en tranĉaĵoj de dikeco de 2 aŭ 3 milimetroj la kompaktnajn partojn de la fungo kaj oni lasas ilin libera aero kaj en plena suno ĝis sekeco, kiu devas okazi la plej eble rapide por eviti eventualajn malpurigojn. En la *Boletus edulis* kaj en malmultaj aliaj specoj oni traktas la tutan fungon, ĉapelon kaj tigon, kaj kiam la fungo estas malgranda oni tranĉas en tranĉaĵoj la tutan fungon sen separo de la ĉapelo de la tigo; en preskaŭ ĉiuj aliaj

specoj oni forĵetas la tigon ĉar ĝi estas kava. Iuj grupoj, kiel ekzemple la laktarioj, ne estas taŭgaj por la sekigo. Fungojn bone sekigitajn oni povas pecetigi kaj redukti en pulvoro, akirante aroman spicaĵon. La sekigitajn fungojn oni povas konservi en saketoj dum senlima tempo kaj por kuiri ilin oni devas moligi ilin antaŭ la manipulado, lasante ilin en freŝa akvo dum kelkaj horoj.

Multaj estas la manieroj prepari fungojn por la manĝado kuirante ilin, sed ni indikos nur tri plej kutimajn el la receptoj:

1) *Fungoj en ragua saŭco*. Oni tranĉas la fungojn en maldikaj tranĉaĵoj, oni metas ilin en kaserolo kun oleo kaj peco de ajlo, oni kuiras ilin malrapide ĝis sekeco; oni aldonas malmulte da pecetigita tomato, salon kaj origanon (aŭ alia aroma labiaco) daŭrante ankoraŭ iomete la kuiradon kun la kovrilo sed atentante ke ĝi ne estu troa, ĉar la boneco de la fungo konsistas en malforta krakado sub la dentoj.

2) *Frititaj fungoj*. Por ĉi tiu kuirmaniero estas tre taŭgaj la tutaj ĉapeloj, se ne tro dikaj, senigitaj de la tigo, sed se la ĉapeloj estas tro grandaj (ekzemple ĉe la *Lepiota procera*, n. 10) oni dividas ilin en tri aŭ kvar partoj. Male, por la dikĉapelaj fungoj (ekzemple la boletoj kaj precipe la *Boletus edulis*, n. 47) ili devas havi dikecon malpli ol duono centimetro. Oni pasigas ilin en ovo kaj pistita seka pano kaj oni fritas ilin en oleo ĝis ora koloro.

3) *Fungoj kuiritaj sur la krado*. Oni ŝmiras la tutajn ĉapelojn (aŭ triono aŭ kvarono da ili se ili estas tro grandaj) per oleo, ankaŭ malpeze frotante ilin per peco de ajlo; oni metas ilin sur kradrostilo kaj kiam kuiritaj oni salas kaj oni pudras ilin per origano (aŭ alia aroma labiaco).

Boletus edulis (n. 47) estas taŭga por la tri kuirmanieroj, *Lepiota procera* (n. 10) kaj *Lactarius deliciosus* (n. 15) precipe por la dua, *Amanita caesarea* (n. 8) por la tria. Cetere, oni povas tre bone provi ĉiujn tri kuirmanierojn kaj aliajn por ĉiuj kvalitoj. Ni lasu la pason al la dommastrino, eble vi trovos novajn mangaĵojn!

Fine oni povas ankaŭ konservi la fungojn en vinagro por servi ilin kiel antaŭmanĝaĵo. Oni elektas malgrandajn fungojn (estas preskaŭ nur la *Boletus edulis* kiu taŭgas por ĉi tio) kaj oni kuiras ilin en akvo entenanta iomete da salo kaj vinagro. Oni kuiras ankaŭ dum kelkaj minutoj vinagron kun spicaĵoj; kiam la vinagro estas ree malvarmiĝita, oni versas ĝin sur la fungoj kiujn oni metis en vitra potoj, kaj oni bone fermas la vazojn.

KONKLUDO

Jen la malgranda «ŝlosilo» por reĝoni centon kaj duonon da nialandaj specoj de fungoj kaj precipe por eviti, mi esperas, la plej venenan el ili, la preskaŭ unikan mortigan Amanita phalloides.

En ĉiuj dubaj kazoj de reĝono aŭ de determino, memoru la prudenton kaj detenu vin de la manĝado aŭ konsultu veran kompetentulon.

Mi volonte diras ke mi estus je la dispono de ĉiuj por reĝoni kaj determini specon, aĝero ĉiun mi tre volonte farus, ĉiam kapabla, sed bedaŭrinde la fungoj estas tre malfirma materio kaj nur kelkajn horojn post la rikolto ili povas esti ne plu bone reĝoneblaj; priskribo malmulte utilas kaj skizo aŭ desegno estas malfacilaj. Tamen mi tre volonte ricevos informojn pri la trovitaj fungoj ĉar mi estas certa ke multaj el ili povos utili al mi ankaŭ por eventuala pli vasta dua eldono de ĉi tiu verketo.

Fine mi devas kompreneble deklari ke mi malakceptos ĉiun respondecon pri konsekvencoj al la sano devenantaj de manĝado de fungoj, ĉar similaj konsekvencoj povas deveni de multaj aliaj kaŭzoj, plene sendependaj de la interpreto de mia verketo.

Tamen al ĉiuj mi bondeziras plenan ĝuon de tiu natura riĉeco kaj por tio pli profundan konon en tiu neelĉerpebla kampo de la naturscienco.

Varese, Julio 1961.

Hemia inĝeniero MARIO SIMONDETTI

Fakdelegito por Naturscienco kaj M. A. de Universala Esperanto Asocio (Nederlando) por Varese (Italujo)

Aktiva membro de Universala Ligo (Nederlando)

Direktoro de la Esperanta Katedro de Varese, depende de la Itala Instituto de Esperanto (Florenco)

Membro de la Itala Asocio de Natursciencoj (Milano)

Membro de la Itala Entomologia Asocio (Genova)

Membro de la Itala Geografia Asocio (Roma)





